

OKTOBRO 1910^a

MISTERA KRIMO

AMUZA UNUAKTA KOMEDIETO
KIUN ARANGIS AL ESPERANTO,

MIKAELO CASES

Eks. { PREZIDANTO DE ESPERO KATALUNA KAJ
ĈEFREDAKTORO DE TUTMONDA ESPERO



Prezo: 40 Spesdekoj (1 franko)

Aĉetebla per antaŭsendo de enlan-
daj aŭ eksterlandaj poŝtmarkoj aŭ
respondekuponoj al la jena adreso:

S-ro MIKAELO CASES
Strato Salmeron, 229, 4.º 2.º
Barcelona (España)

Dany R-J
7.000

MISTERA KRIMO

AMUZA UNUAKTA KOMEDIETO
KIUN ARANGĪS AL ESPERANTO,

MIKAELO CASES

PREZIDANTO DE ESPERO KATALUNA KAJ
ĈEFREDAKTORO DE TUTMONDA ESPERO



8-1-6-T

R. TOSELLA: impresor, — 18. Carmen, 18

BARCELONA

1910

Al distinginda esperantisto
S. ro. G. Zwano.

Kun samideanaj salutoj

Mikaelo Casaf


Barcelona $\frac{XII}{911}$

PERSONARO

Baltazarino	S-ro Bruno
Julno	Ramono
S-ino Rimedoj	Manuelo
Rozo	Antono
Luko	Ludanto 1. ^a
Karolo	Ludanto 2. ^a
Johanĉjo	

DEKORACIO

Saloneto en la teretaĝo de kafejo-restoracio de vilaĝo. Tri pordojn, dekstre al aktoro; du maldekstre, kaj unu en la fundo, kun kristaloj. Super la tria pordo dekstra, literaro, kiu diras: «BILARDO». Estas kelkaj ŝtupoj por supreniri. Super la dua pordo, de la sama flanko, oni vidas la numeron 4. La unua pordo maldekstre, alkondukas al malgranda ĉambro, kiu havas fenestron atingeblan, lokita antaŭ la publiko. Por supreniri al la nomita pordo, estas ankaŭ du aŭ tri ŝtupoj. La fenestro ne devas esti alta. La aktoro, kiu sidos post ĝi, bezonas esti bone vidata de la publiko. Kontraŭ la muro de la fundo, maldekstre, montrotablo enhavante botelojn, glaŝojn, manĝilojn, tablotuĥojn, registro-libron, inkujon, kandelingojn, k. t. p. Dekstren, en unua loko, antikva tablo el ligno. Sur ĝi, lampo ekbruligita. Alia lampo sur la montrobalo. Apud la tablo, benko kaj malglataj seĝoj. Inter la du pordoj, maldekstre, alia tablo, pli malgranda, kovrita per verda tapiŝo.





SCENO UNUA

RAMONO

Sidante sur la benko legas ĵurnalon.

Tio-ĉi estas terura : Sed timeginde terura (*Legante*). « La kapo de la oferitino estis diskunigita el la trunko. En ŝia brusto estis du profundaj vundoj. Ĉio ebligas supozi ke la perfidmortiginto sangavidiĝis frenezege je la malfeliĉulino ». Terura! (*Legante*). « Sorte la atakanto konfesis sian krimon kaj la Justeco punos lin ». Terura ! Kaj kun tiu ĉi estas jam kvar la krimoj, kiujn ni malkaŝis dum tiu jaro en la vilaĝo. Kaj mi diras ni malkaŝis, ĉar oni ŝuldas al mi du eltrovaĵojn. Kaj nur per simplaj suspektoj. Por tio mi posedas neerareman vidadon. Mi devis esti Policano anstataŭ pramisto.

SCENO II^a

RAMONO, BALTAZARINO, kaj ROZO tra la fundo maldekstra

BALT. Kunprenu tiujn telerojn kaj ilin kunportu internen.

ROZO. Nu ! Kion faras ci je tiu-ĉi horo (*Al Ramono*).

RAM. Mi estis legante la historion publikigita de ĵurnalo el Madrido pri perfidmortigo de tiu malfeliĉa virino.

ROZO. Ĉu la Basilisino ?

BALT. Kion diras la ĵurnalo ?

- RAM. Ĉion. Ke ŝia fianĉo detranĉis ŝian kapon kaj faris al ŝi du ponardovundojn en la brusto.
- BALT. Ho, mia Dio, de mia animo! Mi mortas pro timo. Ĉiutage oni mortigas iun!
- RAM. De unu jaro, ŝajnas ke ĉiuj krimuloj emas tiun ĉi vilagon.
- BALT. Antaŭ ne longe la ŝtelo al Justo kiu, krom tio, estis vundita.
- ROZO. Kaj antaŭe la mortigo de la onklo Aerabru-movado.
- RAM. Tiun mi malkaŝis. Ĉu vi memoras?
- ROZO. Estas vero. Al mia edzo oni ŝuldas la malkaŝon Se ci ne estus trovinte lin ĉe la puto, neniu estus sciinte ion.
- RAM. Nu! Kompreneble. Mia ĉefa emo estas malkaŝi krimojn. Mi posedas veran lertecon por tio ĉi. Kaj specialan trafon. De kiam ci servis ĉe Sinjoro Luko, sekretario de la Juĝisto el tiu ĉi vilaĝo kaj mi aŭdis paroli pri ŝteloj kaj mortigoj, venis al mi tian emon. Kion mi ne flaru... Nu!
- BALT. Bone, bone. Ne parolu pri tiuj malagrabloj. Kion vi devas fari estas foriri al via devigo kaj lasi nin trankvilaj.
- RAM. Tuj. Mi iras etendi la reton por vidi ĉu mi fiŝkaptos ion dum tiu ĉi nokto.
- ROZO. Ĉu iun ajn alian krimon?
- RAM. Ne, edzino, ne. La fiŝojn, kiuj sufiĉegas ĉe la rivero (*Al Baltazarino*). Per ili vi povos regali al klientoj.
- BALT. Rapidu. Ne haltigu plu.
- RAM. Ĝis poste. (*Al Rozo*). Adiaŭ belegulino. (*Ĉirkaŭprenas ŝin*).
- ROZO. Zorgu kion ci faros. La nokto estas malluma kaj la rivero profunda.
- RAM. Ne timu. Ni nin konas reciproke. Adiaŭ, karulino!
- BALT. Ĉu vi volas resti trankvila?
- RAM. Nu! Do tion mi faras. (*Foriras tra la fundo dekstra*).
- ROZO: Malfeliĉuleto. Pasie li amas min!
- BALT. Mi jam diris al vi ke forigu tiujn telerojn. (*Rozo prenas kun si la telerojn el la montrotablo kaj foriras tra la dua pordo maldekstra*).

SCENO III*

BALTAZARINO, LUKO, JOHANĈJO, MANUELO kaj ANTONO
tra la fundo.

LUKO. Internen, Sinjoroj.

ĈIUJ. Bonan vesperon !

BALT. Bonan vesperon sinjoro Sekretario. *(Al Luko)*

Ĉu vi ĉiuj venas kiel kutime ludi la bilardon ?

LUKO. Trafita; hieraŭ mi perdis kaj hodiaŭ mi bezonas la revengon.

BALT. Do iru al ĝi; ĉio estas preta.

LUKO. Sinjoroj; mi avertas vin ke ĝis la 11^a vi povas kalkuli sur min. De tiu ĉi horo mi ne apartenas al mi. Vi jam scias ke la S-ro Juĝisto foriris tiun ĉi matenon kaj mi estas devigata anstataŭi lin ĝis sia reveno. Tial, nune, mi estas Juĝistanstataŭanto.

JOH. Kaj kion vi devas fari, je la 11^a.

LUKO. Nenion. Sed tio ne estas grava. Juĝistanstataŭanto ĉiam devas esti laborplena.

BALT. Kaj kien iris la juĝisto ?

LUKO. Li iris serĉi kelkajn detalojn pri la Basilisina krimo. Kia bela afero, ho ! Virino buĉita. Tien, la kapo; la korpo, tien-ĉi... Ho ! Ho !
(Kun granda ĝojo).

JOH. Ŝajnas ke tio plaĉas al vi !

LUKO. Kompreneble. Jes, sinjoro. Tio-ĉi estas krimo !
Iu ajn povas atingi famon kaj gloron dank' al ĝi.

BALT. Kia barbaraĵo.

LUKO. Mi parolas kiel juĝisto. Ĉar, fine, kio estas juĝisto ? Por kio taŭgas juĝisto ? Se ne estus kulpoj aŭ krimoj, ne estus juĝistoj kaj, sekve, ne estus sekretarioj. Ju pli granda estas krimo, despli granda kvanto da juĝisto estas bezona. Ĉu oni ŝtelas vulgare ? Ĉu malpacigas iujn ajn kaj donacas unu la alian du aŭ tri vundetojn ? Mizeroj ! Ne sinjoro. La juĝisto bezonas ion grandan, grandegan, monstran. Tiel, oni parolas pri liaj saĝeco,

lerteco, talento, k. t. p. Kiel mi deziras, nun, ke mi estas Jugistanstataŭanto, tielan entreprenon!

BALT. Ha, ĉu vi tion deziras ?

LUKO. Jes sinjorino ke oni buĉu iun ajn.

BALT. Mia Dio !

LUKO. Mi parolas kiel Jugistanstataŭanto. Komprenoble, kiel honora homo, mi tion treege bedaŭrus; sed kiel jugista oficisto, mi estus nepriskribeble ĝojega.

ANT. Kaj oni tion komprenas.

MAN. Certe, tuj oni tion komprenas

BALT. Do, mi, tion ne komprenas. Nu !

LUKO. Vidi la Jugisto sian nomon en la ĵurnaloj! Esti li la celo de la publika scivolemeco! Entrepreni resumon! Atente gardi ĝian sekreton! La sekreton de la resumo! Mi min sentas dancema pro ĝojo nur pensante pri tio!

JOH. Laŭ tio, vi estus feliĉa se, kiel eble plej baldaŭ okazus io eksterordinara.

LUKO. Kalkulu. Mi ĵus komencis mian ekzercadon kaj se oni ne mortigas duonon da dekduo de personoj, kiel mi sukcesos ?

JOH. Do, restu trankvila. Morgaŭ mi kontentigos vin.

ĈIUJ. Ĉu ?

BALT. Kiel ! Ĉu vi intencas mortigi iun, morgaŭ ?

JOH. Jes sinjorino. Mi tion decidis; mi estas decidita.

LUK. Ĉu mortigi !... al kiu ?

JOH. Tiun, kiun ankoraŭ mi ne konas lin.

BALT. Ha ! Li parolas, sendube, pri sia amkonkuranto.

JOH. Jes, sinjorino. Li alvenos morgaŭ tiun ĉi vilagon por edziĝi kun tiu kiun mi amas. Sia patrino protektas lin. Sed mi tion ripetas. Mi estas decidita. Tuj kiam tiu homo eniros en la vilaĝo, mi mortigos lin.

LUKO. Kial vi sciigas al ni tion ? Nu ! Kia sensencaĵo. Tio estus vulgara ! Vi devis silentiĝi, atendi lin kaŝita en la arbaro, detranĉi lian kapon kaj ĝin sendi al lia bopatrino.

BALT. Kia kruelegeco !

LUKO. Tute bela afero ! Ĉu ne ? Kiu povus ĝin kapti !

- MAN. Bone, bone. Ĉu ni ludos aŭ ne ?
ANT. Jes, jes. Sufiĉe pri krimeco.
LUKO. Mi avertas vin ke mi ne donos revengon.
JOH. Malbenita sorto mia !
LUKO. Ĉu vi aŭdas ? Li plendas pri sia sorto kaj hieraŭ gajnis al mi unu spesmilon !
JOH. Kiu pensas pri tio ? Mi rilatas al mia fianĉino.
LUKO. Oni edzinigas ŝin kun alia kaj li ankoraŭ ne estas kontenta... Maldankemulo !
ĈIUJ. Ha, ha, ha. (*Luko kaj la ceteraj eniras la bilardejon ridante kaj petolante. Baltazarino foriras tra la dua maldekstra.*)

SCENO IV^a

KAROLO, tra la fundo.

Lia kostumo konsistas el rusa palto aŭ evitakvavesto, longa preskati ĝis la piedoj : nigra ĉapo rusa; bastono, el dika kano, kun argenta prenilo : barbo kaj grandaj lipharoj, blondaj : bluaj okulvitroj : sur la fingro, ringo kun granda brilanto,

Gastejmastrino ! Knabo ! Estas neniu. Despli bone. Tiel mi povos spiri iom. (*Li demetas siajn barbon kaj okulvitrojn*). Nu ! kian varmon havigas al mi tiu malbenita barbo. Sed tiu ĉi maskovesto postulas la plej grandan antaŭzorgon. Kial ? Tre simpla. Tial ke mi ĉeestas sekretan intervidiĝon kaj samtempe mi devas prezenti min al mia estonta edzino, kiun mi ne konas, sed kun kiu mi devas edziĝi por kontentigi mian onklon, kiu aranĝis la edziĝon. La unua intervidiĝo, t. e. la kaŝita, estas kun edzinigita virino. Bela kreitaĵo ! Sed terura karaktero, tiu ŝia ! Se mi ne reprenas al ŝi miajn leterojn kaj sciigas ŝin ke mi edziĝos, mi timas iun ajn skandalon. (*Li elpoŝas paketon da leteroj*). Jen la ŝiaj. Ni intersanĝos, kaj mi finos de unu fojon por ĉiam. La intervidiĝo estos je la naŭa nokte apud la riverbordo. Mi ignoris ke Karolino estas en tiu ĉi vilago antaŭ ok tagoj, sed, tre kompreneble, tion diras ŝia letero. (*Legante unu el ili*). « Mia edzo alvokis min apud li ». Mi, lin ne konas, kvankam jes lian nomon. Luko Akvoturniĝo. Ha, ha, ha ! Akvoturniĝo... (*legante*). « Li alvokis min apud li, kaj tie ĉi mi estas ». Kaj rigardu kia okazo. Ĉi tie an-

kaŭ loĝas mia fianĉino. Ĝuste mi devas prezenti min al ŝi morgaŭ. Kion fari? Mi maskvestiĝis kiel alilanda turisto por ke neniu povu min rekoni, kaj tiel mi alvenos al intervidiĝo kun Karolino. Nepre mi finos rilate ŝin, kaj jam trankvila, sen timon ian, mi reposedos mian veran personecon kaj surgenuiĝante kontraŭ la piedoj de mia estonta edzino, mi ekkrios: mi amas cin kaj, ĝis morto, mi estos cia. Cu? Mi kredas ke iu venas. (*Li remetias siajn barbon kaj okulvitrojn*).

SCENO V^a

KAROLO kaj BALTAZARINO (tra la 2^a pordo maldekstra).

BALT. (*Kunportante kelkajn botelojn da biero*). Mi lokos ĉi tie tiujn ĉi botelojn. (*Sur la montrotablo*).

KAR. Bonan nokton. (*Ŝajnigante fremdulon*).

BALT. Ĉu? (Kiu estas tiu ĉi viraĉo).

KAR. Ĉu vi estas la gastejmastrino?

BALT. Kaj servantino via. (Kia ĉapo tiel stranga).

KAR. Ĉu vi havas disponeblan iun ajn ĉambron por pasigi la nokton?

BALT. Jes, sinjoro, unu belegan, tiun de la numero 4.

KAR. Do... (*Li eltiras sian poŝhorloĝon, ĝin rigardas kaj reenpoŝas*). (Unu kvarono antaŭ la naŭa). Ĝi estas mia.

BALT. Eble vi ne estas el tie ĉi!

KAR. Ne, sinjorino, mi estas el tie. Mi vojaĝas por plezuro. Iu ajn vojaĝas por plezuro.

BALT. Iu ajn. Mi tiel opinias. (Kia speciala homo).

KAR. Do... ĝis revido.

BALT. Momenton. Bonvolu skribi vian nomon en la registrolibro. Estas necesega formalajo.

KAR. Plezurege. (Diablo!)

(*Baltazarino prenas la libron kaj ĝin lokas sur la tablo. Karolo ankaŭ lasas la bastonon sur ĝi por subskribi*).

BALT. Jen ĝi estas.

KAR. (Kaj kian nomon mi enmetos. La mian ne estas eble. Nu! Iu ajn.) (*Li subskribas*).

- BALT. (*Rimarkante la bastonon*). (Bonan prenilon. Similas el densa argento).
- KAR. (Gustavo Morand).
- BALT. (*Rimarkante la manon de Karolo*). Kaj kia bri-
lianto! Ĝi estas tiel granda kiel migdalo).
- KAR. Nu! Jam estas.
- BALT. (*Legante*) «Gustavo Morand». Ĉu vi estas
fremda?
- KAR. Tute ne sinjorino. Mi esta el Pikardio.
- BALT. El kie?
- KAR. El Francujo.
- BALT. Ha! Tiel, ĉu vi estas francano?
- KAR. Ne sinjorino; madridano... ne, jes, francano...
ĝuste.
- BALT. (Hum! io okazas al tiu ĉi sinjoro).
- KAR. Mi trairas tiun ĉi landon por miri siajn mo-
numentojn.
- BALT. Ĉu monumentojn en tiu ĉi vilaĝo? Ĉu en ĝi
estas iu? Iam mi vidis neniun!
- KAR. Ho, jes... belegaj. Kaj krom ili, iaj akvoj...
- BALT. Ha certe; ĝiaj akvoj estas bonegaj.
- KAR. Ĝustatempa. Ĉu la riverbordo estas tre mal-
proksima?
- BALT. Ne, sinjoro, daŭrigu la dekstran flankon kaj
antaŭ dek minutoj... (Kial li bezonas la ri-
verbordon?).
- KAR. (*Rigardante la poŝhorloĝon*). (Nu! mankas kvin
minutoj por la naŭa). Ĝis poste!
- BALT. Ĉu vi revenos baldaŭ?
- KAR. Mi ne scias.
- BALT. Ĉu vi volos noktomanĝi?
- KAR. Eble. Laŭ la cirkonstancoj. Adiaŭ; mi plu ne
povas resti ĉi tie. (*Foriras tra la fundo deks-
tra*).

SCENO VI^a

BALTAZARINO; post JULNJO tra la dekstra fundo.

- BALT. Neniam mi vidis similan modelon. Kiu li estas?
Kaj kion li serĉas en nia vilaĝo?
- JUL. Pĉst, Pĉst!

- BALT. Ĉu Ĵulnjo!
JUL. Silenton!
BALT. Kio okazas? Vi estas maltrankvila.
JUL. Ja, tion mi jesas. Mi venis kurante. Kie estas Johaĉjo?
BALT. Tie, en la bilardejo.
JUL. Tion mi supozis: diru al li kaŝeme, sen ke iu sciigu, ke mi bezonas paroli kun li momenton.
BALT. Sed... kaj se via patrino surprizas al vi tien!
JUL. Mi ne priokupas... mi estas malespera, oni volas ke mi edziniĝu kun iu, kiun mi ne konas, kaj tiu kiun mi adoras estas Johaĉjo.
BALT. Malfeliĉa naivulino.
JUL. Vi estas bonkora kaj vi komprenos mian ĉagrenon.
BALT. Jes, tute certe.
JUL. Avizu lin, panjo havas viziton kaj mi profitos la okazon.
BALT. Kian siplanimecon!
JUL. Mi amegas lin! Rapidu; kaŝeme, ĉu ne?
BALT. (Kompatindulino, mi estus farinta la samon.)
(*Si proksimiĝas al la bilardejo*). Pĉst, Johaĉjo! Eliru momenton (*Al Ĵulnjo*). Finu baldaŭ, ĉar povas okazi ke finigu la vizito. (*Foriras tra la dua maldekstra pordo*).

SCENO VII^a

JULNJO kaj JOHAĈJO.

- JOH. (*Elirante kun la bilardastono*). Kiu alvokas min?
JUL. Mi estas.
JOH. Ĵulnjo! Mia vivo! Koreto mia!
JUL. Kolombeto mia!
JOH. Kaj oni volas diskunigi nin!
JUL. Kaj ne estas evitilo. Morgaŭ alvenos mia estonta edzo. Neniam plu ni revidos nin.
JOH. Tio ĉi estas terura!
LUK. (*Interne*). Johaĉjo!
JOH. Atendu, estas mia vico. (*Li eniras la bilarde-*

jon; oni aŭdas la bruon de la eburaj globoj, kaj li eliras tuj). Kaj kion ni faros? Mi **memmortigos vin** antaŭ ol vidi vin en la brakoj de alia (*preskaŭ plorante*).

JUL. Kaj mi ankaŭ!

JOH. Alvenas al mi ideon!

JUL. Ĝin diru!

JOH. Forkuru ni!

JUL. Kien?

LUK. (*Interne*). Johanĉjo!

JOH. Atendu! (*Alifoj*e eniras: oni aŭdas la saman bruon kiel antaŭe kaj li eliras metante kreton en la bilardbastono kiel kutimas la bilardludantoj).. Kie ni povu ami nin eterne.

JUL. Tion neniam mi faros. Kion oni dirus pri mi?

JOH. Nu! Ankaŭ oni dirus same pri mi, sed al mi ja estas tio indiferenta!

JUL. Ne, ne. Mi estas honesta.

JOH. Kia granda bedaŭro!

JUL. Kio? ke mi estu honesta?

JOH. Ne, ke vi ne povu lasi esti tiel!

JUL. Kion vi diras?

JOH. Alian ideon!

JUL. Diru ĝin!

JOH. Mi kredas ke alifoj e estas mia vico. (*Reeniras saman ludon kiel antaŭe*). Mi duelos kaj mortigos lin.

JUL. Kaj se li mortigas vin?

JOH. Vere. La ideo ne estas bona.

JUL. Kiel malfeliĉaj ni estas!

JOH. Tre! Tro! (*Farante al ŝi tri kisojn en mano*).
Tri!

JUL. Kion vi faras?

JOH. Karambolon!... Nenion gravan!

SCENO VIII^a

JOHANĈJO, JULNJO kaj S-ino RIMEDOJ tra la fundo dekstra.

S. RIM. Mi tion jam supozis!

JUL. Mia panjo!

JOH. Nu!

S. RIM. Kion vi faras ĉi tie? Kial vi venis tien?

- JOH. Zorgu tuŝi ŝin. Se vi ŝin pinĉas, mi ne scias kion mi faros.
- S. RIM. Vi estas kulpa pri ĉio. Vi, kiu frenezigis ŝin.
- JOH. Jes, sinjorino ! Mi estas la sola kulpulo, Kaj ŝi ankaŭ. Kaj vi sciuj ke ni ambaŭ estas deciditaj batali ĝis morto...
- S. RIM. Malbonedukita !
- JOH. (*Kun la bilardbastono kiel defendilo*). Zorgu ne insulti min !
- S. RIM. Iru ni hejmen, fraŭlino. Ni vidos kiu venkos !
- JOH. S-ino Rimedoj ! ne estu tirana !
- JUL. Ne estu tirana, panjo !
- JOH. Rimarku ke Julieta kaj Romeo estis neniu kompare nin.
- S. RIM. Mia filino havas kompromison kun alia viro.
- JOH. Sed unue ĝin havis kun mi.
- S. RIM. Vi ne estas iu.
- JUL. Sinjorino !
- S. RIM. Iru ni hejmen mi ŝlosos cin !
- JOH. Se vi ŝlosas ŝin mi bruligos vian domon.
- S. RIM. Malspritulo !
- JUL. Adiaŭ, adiaŭ por ĉiam !
- JOH. Ne edzinigu ! Ne edzinigu ! Diru ne !
- S. RIM. Ni jam vidos tion. (*Foriras kun Julnjo tra la fundo*).
- JOH. (*En la pordo*). Diru ne ! Dirante ne, ni atingos la venkon... (*Malsupreniras ĝis la antaŭscenejo kaj preskaŭ plorante, samtempe ke me-tante kretton en la bilardbastono diras:*) Nepre mi malsaniĝos pro tiuj malagrablaĵoj

SCENO IX*

JOHANĈJO, BALTAZARINO kaj ROZO, kiu eniras kaj eliras arangante la montrotablon.

- BALT. Kio estas tio ? Kial vi ploras ?
- JOH. Ĉar ne estas solvo ! Oni ŝin edzinigas kun alia !
- BALT. Ne ĉagrenigu !
- JOH. Ĉu tio ŝajnas al vi negrava ? Nu !
- BALT. Ĉio estos arangita, konfidu !
- JOH. Ne. Se ŝi edzinigas, jam ne estas ebla la arango.
- BALT. (Ili estas du infanoj ! Kiu povus diri la samon !)

SCENO X^a

JOHANĈJO, BALTAZARINO, ROZO kaj RAMONO

(Tiu ĉi eliras malkvietega tra la fundo kaj lasas sur la montrotablo la objektojn pri kiuj li poste parolos.)

- RAM. Rapide, tuj! Venu (*Rozo, Baltazarino kaj Joha-
ĉio proksimiĝas al li tre timigitaj*)
- BALT. Kio estas tio?
- JOH. Kio okazas?
- ROZ. Kial ci venas tiel?
- RAM. (*Malfacile parolante pro la agito kiu regas lin*)
Krimon!
- ĈIUJ. Ĉu?
- RAM. us ĝi estis farita en la riverbordo
- BALT. Jezuo!
- ROZ. Kiel tio estis?
- JOH. Ĉu vi estas certa?
- RAM. Ĉu la sekretario alvenis?
- BALT. Tie estas ĉiuj.
- RAM. Ni voku lin (*Ĉiuj proksimiĝas al bilardejo kaj
krias*):
- ĈIUJ. Ĉiuj venu tuj, tujege.

SCENO XI^a

La nomitaj, LUKO, MANĈELO, ANTONO, LUDANTOJ 1^a kaj 2^a (ĉiuj eliras rapide kun la bilardbastonoj en mano, kaj unu post la alia)

- LUK. Kio okazas?
- MAN. Ĉu okazas io?
- RAM. (*Faras signojn. Ĉiuj proksimiĝas formante ron-
don. Ramono parolas mallaŭte*) Kaj tre graval
Krimo ĵus estis plenumita!
- LUK. Ĉu vere? (*Tre kontenta*)
- RAM. Verege!
- LUK. Dankon, mia Dio, dankon!
- BALT. Rakoutu ĝin, se al vi estas eble!
- RAM. Aŭskultu (*Ĉiuj mallargiĝas la rondon*) Mi finis
etendi la reton, tie malsupre, apud la mue-
lejo de la onklo Nikotino...

- ĈIUJ. Jes! jes!
RAM. Tien oni fiskaptas trutojn eĉ salmojn... tiel grandajn...
- ĈIUJ. Bone. Antaŭen. Ni tion scias
RAM. Mi kusigis en mia pramo por dormi, kiam subite...
- BALT. Mia Diapatrino! (*Kriegante*)
LUK. Silentigu, sinjorino!
- ĈIUJ. Daŭrigu, daŭrigu (*Al Ramono*)
RAM. Kiam subite mi aŭdis voĉajn bruojn ne multe malproksime. En la sama riverbordo
- ĈIUJ. Daŭrigu, antaŭen!
RAM. Mi ne povis vidi iun, ĉar la arboj tion malpermesis kaj la nokto estas tre malluma... sed mi aŭdis unue paroli mallaŭte; poste krioj; poste ion similante bataladon; kaj, fine la falon de korpo en la akvon
- BALT. Sankta Mariol!
RAM. Iu, mi ne scias kiu, forkurante malproksimiĝis, kaj mi sen pripensi zas! min ĵetis en la riveron
- ĈIUJ. Brave!
RAM. Mi naĝis al mia reto kaj mi ne trompiĝis, tie estis io kaptita.
- LUK. Ĉu iu viro ?
ROZ. Ĉu iu virino ?
RAM. Tute ne. Tio kio estis kaptita estas tio. (*Li prezentas tion, kion lasis antaŭe en la montrotablo; la rusaĉapon kaj surtuton de Karolo*).
- LUX. Rusan ĉapon.
RAM. Kaj samlandanan palton. Tiuj ĉi vestaĵoj apartenas al suferinto. Sendube lin perfidmortigis kaj ĵetis en la riveron tiu, kiu malproksimiĝis forkurante.
- LUK. Nedubeble, Ni vidu tiujn ĉi vestaĵojn.
BALT. Mia Dio !
ĈIUJ. Ĉu ?
BALT. Ho! jes! Tiu ĉi estas la ĉapo ! Kaj tiu ĉi la palto ! Mi ilin rekonas.
RAM. Ĉu vi ?
LUK. Ĉu vi ilin rekonas ? Al la karcero tuj !
BALT. Kiel al la karcero ?
LUX. Vero . Parolu.

BALT. Ili apartenas al vojaĝanto, kiu antaŭ duono da horo alvenis ĉi tien. Lia nomo estas en la registrolibro.

LUK. Al mi la registrolibron !

BALT. (*Legante*). «Gustavo Morand.»

LUK. Ĉu Morand ? Mi ne konas lin, sed mi ne dubas ke li estas perfidmortigita.

RAM. Mi tion malkaŝis.

LUK. Mistera krimo. Kia ĝojo !

BALT. Nun mi memoras lian embarason, lian strangan aspekton kaj lian... (*Granda krio*). Ho, vel

ĈIUJ. Kio ?

BALT. Li demandis al mi pri la riverbordo !

LUK. Kio ŝajnas al vi ? Dronita !

BALT. Plie li diris nescii ĉu li revenos aŭ ne.

LUK. La pruvoj estas konvinkigaj. Kiel estis tiu malfeliĉulo ?

BALT. Alta, malgrasa kun blonda barbo kaj okulvitroj...

LUK. Ĉu okulvitroj ? Oni mortigis lin !

BALT. Bluaj.

LUK. Ĉu bluaj ? Dronita ! Estas bezono serĉi lian korpon. Ni kaŝu tien tiujn pruvojn. (*Zi kunportas ilin al la dua ĉambro maldekstra*).

RAM. Mi iros zorge ekzameni la riveron.

LUK. Avizu la pedelon (1) (*Al Manuelo*). Vi, kiel aktisto, akompanu ilin. Mi iras tuj komenci la resumon. Ne haltigu.

RAM. Flugante !

LUK. Aŭskultu ! Ne forgesu esplori per lanternoj la riverbordon. Kaj malliberigu ĉiun kiu pasu tra tie. Tuj ! Ni iru fini la ludadon !

BALT. Kiel ! Ĉu vi daŭrigos ludante ?

LUK. Mankas al mi ses karamboloj, mi vetis du spesmilojn kaj vi bone komprenas ke mi defendos mian monon.

RAM. Foriru ni !

ROZ. Mi venos kune.

BALT. Knabino !

ROZ. Mi tuj revenos, sinjorino.

RAM. Mi devis esti policano anstataŭ pramisto.

(1) En Hispanujo, krom tiu de la Universitato, ankaŭ estas nomata tiel la servisto de la Juĝejo.

(Foriras tra la fundo dekstra: Ramono, Manuelo kaj Rozo).

LUK. Perfidmortigon! (Kun la aliaj eniras la bilardejon). Dankon mia Dio!

BALT. (Tre pensema pri la oferito). Malfeliĉa homol kiu estus dirinta al li antaŭ momento... (Foriras duan pordon dekstre).

SCENO XII^a

KAROLO tra la fundo dekstra

(Elegante vestita, sen palton, ĉapon, barbon nek okulvitrojn. Ĉapelon kaj la samajn bastonon kaj ringon). Afero finita. La intervidiĝo ne povis esti pli mallonga. Mi volas edziĝi kaj mi bezonas miajn leterojn. Neniam! Senhonorulo! Fripono! Insultemulo! Rabisto! Neniam plu ni revidos nid! Si donacis al mi vangofrapon. Mi faris krion. Si forkuris, kaj antaŭ sia serioza promeso, mi konsideris min libera kaj feliĉa. Mi ĵetis mian maskveston al la rivero, kaj ĝis neniam plu eksamoro mia. Nu! mi forgesis mian barbon (ĝin elirigas el la poŝo) kiu ĵus mi malmetiĝis. Iomete pli da distreco kaj mi estus enirinte tien kun ĝi en mia vizaĝo. Sorte mi tion memoris deca tempe. Kiel mi bone spiras! Mi jam estas libera. Mi povos morgaŭ viziti mian estontan edzinon sen ia timo. Kiel malsata mi estas (Vokante). Servisto! Kelnero! Iu ajn!

SCENO XIII^a

La nomita kaj BALTAZARINO

BALT. Mi alvenas mi alvenas.

KAR. Tuj. Pretigu la vespermangon. Donu al mi la plej bonan kiun vi havas kaj la plej karan ĉambreon el la domo.

BALT. (Kia ventoturnigulo. Tuj), mia moŝto.

KAR. Mi ĵus alvenis kaj mi mortas pro malsato.

BALT. (Kaj tiu knabino de la diablo lasis min tute sola).

- KAR. Kion ?
- BALT. Nenion, nenion; mi servos al vi rapidege.
- KAR. Kokidoja, ŝinkon, bonegan vinon... ne timigu vin la prezo.
- BALT. Bone, bone. Havu la afablecon antaŭ ĉio, skribi vian nomon en la registrolibro.
- KAR. (Duafoje). Kun granda plezuro. Mi ne estas devigata ĝin kaŝi. (*Lasas la bastonon sur la tablo, kiel la unua fojo kaj sidigas por skribi*). (Demono ! Ĉu tiu ĉi virino rimarkus antaŭe mian ringon ? Ĉu jes ĉu ne, mi ĝi turnigas. (*Li tion faras dum Baltazarino vidas la bastonon. Ĝin memoras kaj ŝia vizaĝo montras la suspekton enirantan en ŝia menso. Tiun ĉi fojon Karolo subskribas sur la montrotablo, dorse al Baltazarino*).
- BALT. (Jezuokristo ! Jes ! Tio estas la bastono de l' alial La sama argenta prenilo ! Ĉu li estos la perfidmortiginto ?)
- KAR. Finita.
- BALT. (*Kun la bastono en la mano kaj timplena*). Ĉu... apartenas al vi... tio ?
- KAR. Jes, dankon. (*Li prezentas sian manplaton por ricevi la bastonon kaj nature, Baltazarino vidas la brilanton*).
- BALT. (La brilanto !)
- KAR. Kion vi diras ?
- BALT. (*Terurigita*). Ne, ne, ne !... Nenion !. Ne sinjoro. (Post mortigi lin, li ŝtelis al li !)
- KAR. Nu ! Kunportu la vespermanĝon.
- BALT. (Tremas miaj kruroj kaj mi ne kuraĝas krii).
- KAR. Sed kion vi faras senmove ?
- BALT. (Kaj se mi krias li ankaŭ mortigos min).
- KAR. Sed kio okazas al vi ?
- BALT. (Ho mia Dio de mia animo !)
- KAR. Nu !
- BALT. Tuj ! (La plej bono estas atendi ke li eniru en sian ĉambron kaj tiam...). Tuj. Prenu la tablotukon, (*Ĝin prenas el la montrotablo kaj jetas ĝin al Karolo*).
- KAR. Nu ! La sistemo estas amuza. Kion fari ! Por fini baldaŭ !... (*Li lokas la tablotukon sur la mangotablo*).
- BALT. (*Elirante tra la 2^a pordo maldekstra kun longa*

rosttenilo; en tiu ĉi, rostita kokido. De kiel eble malproksime, prezentante la rosttenilon al Karolo). Jen la kokido!

KAR. Brave! Ke ĝi venu al mi! (Ĝin tranĉas per tranĉilo kaj forko kaj ĝin kunportas al la mangotablo).

BALT. (Tiel li mortigus sian samulon!)

KAR. Kaj la vino? Ĉu vi ne kunportas la vinon? (Frapante la tablon per la tranĉilo).

BALT. (Forkuregante). Sanktega Mario!

KARL. Ha, ha, ha! Io okazas al tiu ĉi virino.

BALT. (Eliras kun botelo, proksimiĝas kaj ĝin lasastren apud la tablo). Jen la vino.

KARL. Ĉu vi ĝin lasas teren?

BALT. Pardonu!

KARL. Plenigu al mi glason.

BALT. Ĉio, kion vi volu. (Ŝi prenas la glason kaj malproksimiĝas. Versas en ĝi vinon multtre-mante, kaj fine ŝi trinkas la vinon senpripen-se). (Ho mi ne scias kion mi sentas).

KARL. Bonan profiton!

BALT. Pardonu. Ne ĝenigu!

KARL. Tute ne. Kontraŭe. Tio ridigas min.

BALT. Mi revenos. (Foriras kun la botelo kaj glaso).

KARL. Nu! Vi elportiĝas la vino!

BALT. Ne kolerigu. (Ĝin ŝi lasas sur la mangotablo).

KARL. (Nepre ŝi estas iomete)... (Fingromontrante la frunton). Bone alportu al mi alian mangotablon.

BALT. Estas nenio plu.

KARL. Ĉu nenio plu?

BALT. Jes, tute nenio plu.

KARL. Ĉu nek desertoj?

BALT. Nenio. Absolute nenio.

KARL. Kia strangaĵo. Ŝajnas neeble!

BALT. Kiel estas... en tiu domo... tiom da ratoj... je tiu ĉi horo jam restas nenio.

KARL. Mirinde. Tiel, do mi iros al la lito.

BALT. Supren, en la ĉefetagon. Tien. (Montrante la unuan dekstran pordon)

KARL. Ĉu vi donos al mi kandelon?

BALT. Jes, jes. (Ŝi prenas kandelon el la montrotablo, ĝin bruligas kaj lasas teren). Momente,

ne senpaciencu mi petas pro Dio. Jen, ĝi estas tie.

KARL. Ne diskuteble la servmaniero uzata de vi mi neniam vidis nenie. (Mi ripetas: ŝi estas iom ireneza). (*Li prenas la kandeligon*). Nu! Bonan nokton!

BALT. Bonan nokton!

KARL. (*Ŝin rigardante*). (Ha, ha, ha, amuza afero!) (*Foriras tra la unua pordo dekstra*).

BALT. (*Jus Karolo estas foririnta ŝi ŝlosas la pordon kaj kuras al la bilardejo*). Pchŝ! Sinjoro Sekretario! Tujege! Eliru ĉiuj!

SCENO XIV^a

La nomitaj, LUKO, JOHANĈJO, ANTONO kaj la 2 Ludantoj ĉiuj aliras kurante kun la ludbastonoj, kiel la unuan fojon.

LUK. Ĉu okazas io?

JOH. Kio estas?

ANT. Ĉu revenis Ramono?

BALT. Ĉist! (*Mallaŭte parolante*). Li estas kaptita.

LUK. Kiu?

BALT. Mallaŭte parolu!

LUK. Kiu? (*Tre mallaŭte*).

BALT. Tiu kiu perfidmortigis S-rou Morand.

LUK. (*Batante per la ludbastono la piedon de Johanĉjo*). Korno! (1).

JOH. Ve! (*Plendante pri la doloro*).

BALT. Li estas ŝtelinta al li la bastonon kaj la ringon, kiun li kaŝis zorge. Mi rékonis ilin ambaŭ objektojn.

LUK. Sed, kie li estas?

BALT. Supre: mi kredis morti pro timo; li nenion suspektas.

LUK. Estas necese tuj malliberigi lin.

ANT. Diru, kaj se li ne estas tiu, kiun ni serĉas?

LUK. Ne grave. Oni malliberigos lin. La afero estas malliberigi la tutan mondon (2). Ni iru.

ANT. Vi Johanĉjo, kaptu lin.

(1) Hispana interjekcio por montri surprizon.

(2) Hispana trograndigo ofte uzata.

- JOH. Cu mi? Ne, sinjoro, mi ne kuraĝas.
LUK. Tedas min la malkuraĝuloj. Iru vi, Antono.
ANT. Mi timas ke tia kanajlo kunportu mortigilojn.
LUK. Nu, kia rimarko! Se mi tion ne pensis ankaŭ mi jam estus suprenirinta.
ANT. Sincere, tiu afero apartenas al vi, S-ro Sekretario.
LUK. Alia malkuraĝaĉulo! Tio naŭzas min.
ANT. Iru ni ĉiuj!
LUK. Bonan ideon, kaj mi lastaloke; aliparte nenion ni povas timi kunportante tiajn batalilojn, (*Pri la ludbastonoj*). Nu! Al la afero! Iom post iom kaj silente. (*Ĉiuj kun la ludbastonoj kiel militapafilo eniras la unuan pordon dekstran; Luko, la lasta*).
BALT. (*Per granda krio*). Haj! (*Ĉiuj forkuras maldekstren*).
LUK. Kion?
BALT. Mi kredis aŭdi bruon.
LUK. Dum mia tuta vivo neniam mi vidis saman malkuraĝecon. Supren!, kaj neniu timu! (*Ili eniras kun granda timo*).

SCENO XV^a

BALTAZARINO, poste S-ino. RIMEDOJ kaj JULNJO tra la fundo dekstra.

- BALT. Li jam ne povas sin liberigi, esceptinte ke li mortigu ĉiujn per iu ajn armilo. (*Atentante*).
RIMED. Baltazarino!
BALT. (*Granda krio kaj tre tremigita*). Haj!
RIM. Estas mi.
JUL. Ni estas.
BALT. Terura timo kaptis min.
RIM. Ĉu estas yero tio, kion oni diras?
BALT. Verego; mi ne scias kion oni diras, sed mi ĝin supozas.
JUL. Ke Ramono malkaŝis teruran krimon.
RIM. Homo perfidmortigita ĉe rivero.
BALT. Tio estas; la rivero perfidmortigita per

homo... ne... homo kiu perfidmortigis la riveron.

RIM. Ni ne volis reiri hejmen sen scii per vi mem la veron.

JUL. Ĉu oni malliberigis la perfidmortiginton?

BALT. Jus oni estas malliberigante lin.

RIM. Jezuo !

JUL. Kien ?

BALT. Supren en la ĉefetago.

RIM. Sed ĉu li estas tie ĉi ?

JUL. Ho; kiun timon !

BALT. Timo, tiu kiu kaptis min; jes, sinjorino. Tie ĉi li estas kaj mi servis al li la noktomanĝon.

RIM. Ĉu vi ?

BALT. Kaj rimarku pri...

SCENO XVI^a

La nomitaj, RAMONO, MANUELO kaj ROZÓ tra la fundo.

RAM. Nenion.

RIM.

BALT. } Haj !

JUL. }

BALT. Nu ! Li estas Ramono.

RAM. Senutile ni reserĉis la tutan riverbordon. Ĉio estis vane. La kadavro ne aperas.

BALT. Sed aperis la perfidmortiginto.

RAM.

MAN. } Kion ?

ROZ. }

RAM. Kiu lin malkaŝis ?

BALT. Mi antaŭ momento; kaj ĵus ili supreniris malliberigi lin.

RAM. Ĉu tio ĉi esta eble ?

BALT. Silenton. Ili jam malsupreniras.

JUL. Ni foriru panjo.

RIM. Atendu. (*Ĉiuj posteniras ĝis la montrotablon*).

SCENO XVII

La nomitaj, KAROLO, LUKO, ANTONO, JOHANĈJO
kaj LUDANTOJ.

- KAR. Tio estas trouzaĵo. Nekvalifikebla atako.
LUK. Silentigu kaj antaŭen!
RIM. Li estas tre juna!
JUL. Sed tre malbela.
RIM. Kiel vi volas ke li estu bela: se li estas per-
fidmortigisto!
KAR. Ni finu! Kion tio ĉi signifas? Kian rajton vi
havas por devigi homon forlasi la liton kaj
tiel konduki lin tie ĉi?
LUK. La rajton tiel leĝan kiel nerefuteblan kiun mi
posedas, ĉar mi estas anstataŭanta Juĝisto de
tiu ĉi Juĝejo.
KARL. Kion? Mi ne komprenas vin.
LUK. Silentu. Vi estas kulpigita pri krimo.
KARL. Ĉu mi?
LUK. Silentu! Pri krimo freŝeta; kompreneble, ĝi
okazis en la rivero!
KARL. Kian tromalsaĝaĵon!
LUK. Kiel vi estas nomata?
KAR. Kiel plaĉas al mi.
LUK. Li kaŝas sian nomon.
KAR. Sed, sinjoroj, ĉu vi estas frenezaj?
BALT. Lia nomo estas en la registrolibro.
LUK. Certe.
BALT. (*Kunportante la registrolibron*). La lasta, sin-
joro Sekretario.
LUK. (*Legante*). Karolo de Espinosa.
RIM. Granda Dio! (*Ĉiuj rigardas S-inon. Rimedoj*).
LUK. Ĉu?
RIM. (*Al Karolo*). Ĉu vi estas Karolo de Espinosa?
KAR. La sama, mi tion ne devas kaŝi.
RIM. La estonta edzo de mia filino!
JUL. Mia fianĉo!
KAR. Kiel, ĉu vi estas Julnjo? Kaj vi S-ino. Rime-
doj? Sinjorino, mi havas la plezuron... (*Li
prezentas al ili la manon. Ili malantaŭeni-
ras*).

- RIM. Ne! Ne tuŝu min?
- JUL. Ĉu vi ĝin vidas panjo? Ĉu vi vidas kiel li estas perfidmortigisto?
- JOH. Ĉu vi ĝin vidas S-ino Rimedoj?
- RIM. Neeble. Mi tion ne povas kredi.
- LUK. Do ĝin kredu, ĉar estas nenia dubo pri tio ĉi.
- JOH. Nenia dubo! Li estas rabisto.
- KAR. Nu! sufiĉaj ŝercoj.
- LUK. Silenton. Ĉu vi neos ke vi perfidmortigis, ŝtelis kaj ĵetis en la akvo homon altan, blondan, kiu kunportis okulvitrojn kaj estis nomata Gustavo Morand?
- KAL. Kiel? Ĉu Morand? Ke mi perfidmortigis... ha, ha, ha! Lasu min ridi!
- LUK. Vi kunportas lian bastonon kaj liajn juvelojn. La samaj kiujn rekonis la restoracimastro.
- BALT. Sendube. Tiu ringo estas tiu kiun kunportis la alia sinjoro. Kaj ankaŭ la bastonon.
- KARL. Tion mi certigas!.. Nu, ne!; necerte!
- LUK. Li konfesas. Ke oni kunportu la senigaĵojn de tiu malfeliĉulo. (*Ramono eliras kaj revenas kun la palto kaj ĉapo rusaj*).
- KAR. Ĉu la senigaĵojn?
- RAM. Jen ili, sinjoro Sekretario. Mi malkaŝis la krimon!
- LUK. Ĉu vi memoras kaj rekonas tiujn ĉi vestaĵojn?
- KARL. Estas kurioza! Kiu ilin kaptis?
- ĈIUJ. Li rekonas ilin!
- KAR. Nel (*Demono, se mia fianĉino sciis...*) Ne, mi ne rekonas ilin.
- LUK. Sekve, vi estas konvinkigita kaj konfesita.
- KAR. Ĉu mi? Mi protestas. Tio estas barbaraĵo!
- LUK. Zorgu kaj insultu neniun.
- JOH. (*Al Karolo*). Ĉu ci pretendis edziĝi kun tiu kiun mi amas?
- KARL. Ĉu? Kion diras tiu ĉi simio?
- JUL. Ĉu vi deziris detrui nian feliĉecon?
- KARL. Nu; nu!
- RIM. Silentigu ambaŭe.
- JOH. Sufiĉas rigardi lian nazon!
- KAR. Nu, nu! Do vi amis unu la alian? Bone, bone!

- LUK. Silenton. Mi komencas la resumon. Ĉiuj restas malliberigitaj.
- RIM. Kiel, ĉiuj ?
- LUK. El tie ĉi ne eliros nek unu muso. Iru ĉiuj al tiu ĉambro. (*Duan dekstran*).
- ĈIUJ. Sed...
- LUK. Antaŭen! (*Eniras ĉiuj escepte Karolo kaj Johaĉjo*). Vi restas kune kaj senkomunike ĝis nova ordono. Vi restos tie kun gardostaranto.
- JOHA. Mi prenas sur min lian gardadon.
- LUK. Starigu antaŭ la pordo kaj se li intencas foriri... pafoni t. e. baton per la ludbastono. Mi iras prepari ĉion konvenan por la resume. Venu kun mi S-ro Aktisto (*Foriras kun Manuelo tra la fundo dekstra*).

SCENO XVIII^a

KAROLO kaj JOHANĈJO. Tiu ĉi promenas kun la ludbastono sur la ŝultro.

- KAR. Mia aventuro ne povas esti pli komika. Mi perfidmortigis Morand. Tio estas, min mem. Per unu sola vorto mi malkaŝas ĉion, sed tiu gento estas tre obstina. Ili volos scii mian sekreton, ili klopodos elserĉi la plej malgrandajn detalojn kaj atingos la kialon de mia maskavesto. Ho! Tio, neniam. Rilate al mia fianĉino nenia priokupo. Ŝi amas alian. Mi min gratulas tion scii nun, pli bone ol poste. La plej bono estas daŭrigi la farson tial ke nenia danĝero minacas min.

SCENO XIX^a

La nomitaj kaj BRUNO.

- BRUN. Ĉu vi permesas ?
- JOH. For!
- BRUN. Mi kunportas permeson de la Sekretario, kiun mi ĵus trovis.
- JOH. Tiel eniru.

BRUN. Via servanto. (*Al Karolo*).

KARL. Dankon. Same.

BRUN. Ĉu vi estas la kulpigito ?

KARL. Jes, sinjoro, sed mallerte.

BRUN. Ĉist !

KARL. Ĉu ?

BRUN. Vi povas paroli al mi senkaŝeme, per tuta sincereco. Mi estas advokato. Mi ĵus sciis la novaĵon kaj mi venas por ricevi viajn ordonojn.

KARL. (Nu ! Tiu ĉi ne sin distras).

BRUN. Se vi akceptas min kiel via defendanto, mi certigas vin ke ĉio estos aranĝita.

KARL. Mi tre dankas, sinjoro, vian intereson, sed mi estas senkulpa. Mi bezonas nenium por defendi min.

BRUN. Malbona sistemo.

KARL. Ĉu ?

BRUN. Ĉion nei. Danĝera sistemo. Mi konsilas al vi ke vi ĝin forlasu.

KARL. Mi ripetas ke mi estas senkulpa.

BRUN. Sed sinjoro, ĉu vi kredas trompi min ? Vi estas perfidmortigisto. Sufiĉas vidi vin.

KARL. Sinjoro !

BRUN. Konfesu. Mia defenda sistemo estas la konfeso; konfesante, nepre vi atingos 15 malliberejajn jarojn.

KARL. Nu !

BRUN. Sed ne konfesante vi povos iri al la eŝafodo. Sufiĉe, sufiĉe. Aĉero finita. Konfesi. Tio estas la plej konvena. Ĉiuj miaj klientoj atingis ĉiam iliajn dekvin jaretojn.

KARL. Kia negoco ! Belmaniero defendi ilin.

SCENO XX^a

La nomitaj, LUKO kaj MANUELO. (MANUELO kunportas dikegan paperpaketon).

LUK. Jen ni revenas. Ĉi tie estas jam notitaj la unuaj deklarioj. (*Montrante la paperpaketon*).

- JOH. Kion vi kunportas tie, S-ro Luko ?
LUK. La resumon.
JOH. Sed ĉu vi jam skribis tiom ?
LUK. Ne. Mi ĝin preparis de longe. Ĝi konsistas el generalaj deklarioj, aplikeblaj al ĉiuj cirkonstancoj. Nun mi aldonos tion kio estu necesa kaj jen sep mil folioj pretaj dum kvin minutoj. Bone, alproksimiĝu tiun seĝon. (*Johanĉjo kaj Manuĉlo ankaŭ alproksimiĝas al la malgranda tablo*). Sidigu. (*Al Manuĉlo*). Kaj vi ankaŭ, S-ro Bruno.
BRUN. Mi ekuzos mian rajton. (*Al Karolo*). Vi konfesu kaj lasu min diri.
KAR. Iru promeni !
LUK. Mi komencos por la atestantoj... Alvoku Baltazarinon.
JOH. (*Irante al 2^a dekstra*). La atestantino Baltazarino.

SCENO XXI^a

La nomitaj kaj BALTAZARINO.

- BALT. Servantino via
LUK. Kiel vi estas nomata ?
BALT. Vi tion jam scias !
LUK. Bone. Vi forgesu tion. Kiel vi estas nomata ?
BALT. Baltazarino Prieto.
LUK. Ĉu via aĝo ?
BALT. Konstatigu pli ol kvardek jarojn.
LUK. Mi ĝin kredas ! Kaj pli ol sesdek ankaŭ. Ĉu via stato ?
BALT. Vidvino.
LUK. Ĉu profesio ?
BALT. Mastrino de restoracio.
LUK. Restoraciino. Kie vi loĝas ?
BALT. Tie.
LUK. Ĉu vi ĵuras diri la veron ?
BALT. Mi tion ĵuras.
LUK. Oni ne ĵuras tiel. Per la dekstra brako etendita kaj la mano simulante krucon.
BALT. (*Tiel ĝin farante*). Jam estas.
LUK. Per la dekstra brako.

BALT. Ĉu ?

LUK. La brako dekstra.

BALT. Do tiu ĉi estas la dekstra.

LUK. (*Stariĝas kaj proksimiĝas al Baltazarino sin lo-
kante sammaniere ol ŝi, antaŭ la tablo*). La...
Nu ! Jes ! Kiel vi estis turnita, kontraŭe al
mi... (*Li residigas alifoj*). Diru ĉiom kiom vi
sciu rilate al la krimo...

BALT. Vi ĝin jam scias. Aperis Morand, mendis
ĉambron, mi rimarkis liajn bastono kaj rin-
gon, li malaperis, poste venis tiun alian kaj
jen finita la rakonto.

LUK. Mi kontraŭvizagigos unu la alian.

BALT. Kio estas kontraŭvizagi ?

LUK. Vi vidos. Kulpigito ĉu vi rekonas tiun ĉi viri-
non ?

KARL. Jes.

LUK. Kio ŝajnas al vi ?

KARL. Malsprita maljunulino.

BALT. Aŭskultu !

LUK. Silenton !... Iru al la alia flanko. (*Baltazarino
iras dekstren, apud la tablo*).

BRUN. Momenton. Ĉio tio ĉi estas senutila. Mia de-
fendito sin konfesas aŭtoro de la krimo.

KARL. Ĉu mi ? Neniel !

BRUN. Konfesu. KREDU MIN !

KARL. Mi ne konfesas, nul

LUK. Venigu la atestanton Ramono.

JOH. Atestanto Ramono.

SCENO XXII^a

La nomitaj kaj RAMONO.

RAM. Kion vi volas ?

LUK. Kiel vi estas nomata ? Kioma ago vi estas ? Kie
vi loĝas ? Pri kio vi laboras ?

RAM. Nu, nu ! Sufiĉe vi konas min, S-ro Luko.

LUK. Ne nomu min, nun S-ron. Luko. Nomu min
S-ro Juĝisto. Antaŭen ! Rakontu kun ĉiuj
detaloj la sangon scenon kiun vi malkaŝis.

BRUNO. Kial ? Tiu ĉi sinjoro konfesas ; konfesu sen
timo.

- KARL. (Cu vi vetas ke mi piedbato lin ?)
- RAM. Ho, certe, mi ĝin malkaŝis. Mi kuŝis en mia pramo, kiam, subite, mi aŭdis krii dekstre al mi. Estis du viroj. Unu el ili alta, malalteta la alia. Subite la unua sin ĵetas kontraŭ la dua kaj la dua ne triumfas pri la unua; sed la unua eltiras ponardon, atakas la duan... ne, la unua ricevas vangofrapon de la unua... tute ne, de la dua kaj tiam la unua...
- LUK. Ĉu la unua aŭ la dua ?
- BRUN. Eble estis la unua.
- BALT. Mi kredas ke estis la dua.
- LUK. Bonan komplikaĵon ni atingis per la du numeroj.
- RAM. Mi ripetas ke mi estas tre certa. Tiu ĉi viro (*Montrante Karolon*) levis la brakon kaj zazi ponardvundis la alian en la gorĝo.
- BRUN. Estas vero!
- KAR. Ne estas vero!
- BRUN. Kian senefikan klopodon neante ĉiam!
- RAM. Tujli kaptis lin per liaj brakoj kaj ĵetis lin en la akvo, poste senigi al li la bastonon, la ringon kaj paperujon, plenigita per Bankbiletoj. Li forkuris kiel frenezulo. Mi min ĵetis al la rivero kaj nur mi trovis la ĉapon kaj palton de tiu malfeliĉulo.
- KARL. Kia serio da mensogoj!
- LUK. Iom, post iom. Ĉu vi bone vidis ĉion kion ĝis nun vi deklaris.
- RAM. Ĝin vidi, ne, sinjoro, ĉar estis malluma nokto kaj mi nur vidas la aĵojn kiam oni ilin povas vidi.
- LUK. Tiel do, ĉu vi false deklaris ?
- BRUN. Konfesu, diru jes por provi ĉu ni atingos la dek kvin jaretojn.
- RAM. Ne, sinjoro. Mi diras tion, kio ŝajnas al mi. Sed mi ĝin malkaŝis. Tiu gloro apartenas al mi.
- LUK. Kulpigito. Kion diras pri tio dirita.
- BRUN. Nenion. La Sinjoro konfesas.
- KAR. Mi diras ke mi estas kolera kaj mi preferas diri la veron.
- BRUN. Dank' al Dio!

- KAR. Sed al vi sola. '
 LUK. Ĉu al mi ? Senkomunike la tuta mondo. Internigu ĉiuj alia fojo. (*Li reeniras tra la dekstra pordo escepte Ramono kaj Bruno*).
 KAR. (*Aparte al Luko*). Tiu ĉi afero, estas honora afero.
 LUK. Ĉu ?
 KAR. Pri virino !
 LUK. Ĉu edzinigita ?
 KAR. Edzinigita.
 LUK. Diru, diru ! Tiuj ĉi aferoj plaĉas multe al mi !
 KAR. Kun ŝi mi havis intervidigon en tiu ĉi vilaĝo.
 LUK. Ĉu kun la edzinigita ?
 KAR. Precize.
 LUK. Ha, ha !... Daŭrigu, daŭrigu !
 KAR. Sed, kiel vi bone komprenos, mi ne deziris esti vidata de iu ajn.
 LUK. Nature !
 KAR. Por eviti tion, mi luis barbon, metis sur mi palton kaj...
 LUK. Ĉia strangago !
 KAR. Ĉu vi ne kredas min ?
 LUK. Jes; jes, sinjoro.
 KAR. Ĉu vere ?
 LUK. Kiel mi estas nomata Luko Akvoturnigo.
 KAR. (Nu ! Ŝia edzo ! Kaj mi estis preta por rakonti al li ĉion. (*Li promenastre rapide. Post li sinjoro Luko, poste Bruno kaj laste Ramono*)).
 LUK. Kio okazas al vi ?
 KAR. Ĉu al mi ? (Malbona afero).
 LUK. Vi estis dirante ke vi luis barbon...
 KAR. Ne, sinjoro. Mi ne diris tion.
 LUK. Por ĉeesti la intervidigon kun la virino edzinigita.
 KAR. Ĉu edzinigita ? Ne, sinjoro, mi ne diris ke ŝi estas edzinigita.
 LUK. Kiel ne ?
 KAR. Vi songas. Vi estas trompanto. (*Li subite haltigas, tuŝegante perforte la aliaj*).
 LUK. Kaj vi grandega fripono ! Ĉu vi vidis ? Li ankoraŭ kuraĝas moki min ! Jam ne estas nenio dubo al mi. Tiu ĉi estas la perfidmortiginto !

- KAR. (Ludante, ludante kaj serco post serco ĉu oni fine havigos al mi la dekkvin jaretojn?)
- LUK. Li devas surporti la Bankbiletojn. Ni serĉu en lian veston kaj en ĉiujn poŝojn.
- ĈIUJ. Jes, jes.
- KAR. (Demonol! Li trovos la leterojn de sia edzino), Iom, post iom. Ne bezone palpi min. Mi donos tiom kiom mi kunportas. La horloĝon. (Luko ĝin jetas sur la tablon). La monujon. (Luko ĝin enpoŝas). La leterujon.
- LUK. Ni vidu la leterujon. (Dum li ekzamenas ĝin Karolo eltiras kaj donas al S-ro Bruno leterpaketon).
- KAR. (Aparte). Gardu vi tion ĉi.
- BRUN. Dank' al Dio. Fine, li konfesas. S-ro Sekretario, tie ĉi estas la pruvoj de lia krimo. (Li donas al Luko la paketon).
- KAR. Besto!
- BRUN. Timu nenion. Konfesante, ne estas danĝero.
- LUK. Ni vidu!
- KAR. (Sanktega Virgulino Mario! Kvankam ili ne estas subskribitaj, tamen li rekonos la skribadon).
- LUK. (Malfermante unu el ili). «Adorita kolombino mia.»
- KARL. (Benita Jezuokristo!)
- LUK. «Ci ne povas imagi la...» Ha, ha, ha!...
- KAR. (Li ne koleras).
- LUK. «Kiel mia edzo estas tiel azena...!» Amuza, amuzega.
- KAR. (Mi spiras; li ne konas la skribadon de sia edzino).
- LUK. «Ĉia sen komplimentoj». Ne estas subskribita. Kia bedaŭro!...
- KAR. Kaj kion vi diras nun?
- LUK. Ke ĉio konspiras kontraŭ vi. Dume eniru tien. (Dua maldekstre).
- KAR. Vi trouzas. Tio estas sensencaĵo. (Eniras en la 2^a ĉambro maldekstra).
- LUK. Silentetu. Vi, S-ro Bruno al via ŝlosejo. (2^a maldekstra).
- BRUN. Ĉu mi? Rimarku ke mi estas advokato.
- LUK. Tial. El tie ĉi neniu eliros. Internen, internen.

SCENO XXIII^a

LUKO kaj RAMONO.

- RAM. Kaj mi, Sinjoro Sekretario ?
LUK. Vi... *(Malfermante kaj legante alian leteron).*
«Idolita stelo». Kiel amuza, amuzega !
- RAM. Legu, legu.
LUK. Mi donus ion ajn por scii ŝian nomon: *(Li legas kaj ridas)*. Ha, ha, ha.
- RAM. Kion ŝi diras, kion ŝi diras ?
LUK. Ŝi diras... Prenu ĝin kaj sciigu vi mem. *(Li donas al li la leteron).*
- RAM. «Idolita...» Nu ! *(Tre energie).*
LUK. Kion ?
RAM. Ne estas dubo! Mi ne trompas min ! Tiu skribado apartenas al mia edzino !
- LUK. Nu ! milo da fojoj !
RAM. Ho, fibubino.
LUK. Ĉu ŝi estas via edzino ? Amuza, amuzega.
RAM. Ĉu vi opinias ke tio ĉi estas amuza ?
LUK. Treege. Sed, diru al mi, ĉu vi estas certa pri tio.
- RAM. Jes, sinjoro. Jen ŝiaj roj (1) kaj ŝiaj hoj... ho ve ! Rigardu, rigardu. «Mia sukera pecetulo amata». Tion saman ŝi diras al mi...
LUK. Ĉu ŝi diras tion al vi ? Ha, ha ha !...
RAM. Ho hundaĉino ! Lasu min ! Mi rompos al ŝi la krurojn.
LUK. Forte, forte ! Sukerapec. . ha, ha, ha ! Sed kiel amuza !... *(Eniras en la unuan ĉambron maldekstran, fermas ĝian pordon kaj sidigas apud la fenestro kontraŭ la publiko)..*
RAM. *(Irante dekstren)*. Rozo ! Rozo !

(1) La litero r (multnombre).

SCENO XXIV^a

La nomitaj kaj ROZO tra la 2^a dekstra.

- ROZ. Cu ni restos ĉi-tie dum la tuta nokto ?
RAM. Venu, venu tien krokodrililo !..
ROZ. Ĉu....
LUK. (*Aŭskultante*). (Kiel amuza !)
RAM. Mi ĉion scias.
ROZ. Kion ci diras ?
RAM. Ci trompis min kiel ĥino !
ROZ. Ĉu mi ?
LUK. (*Sin balancante en la seĝo tre goja*). Ha, ha, ha!..
RAM. Ĉu ci konas tiun leteron ?
ROZ. Jezuo.
RAM. Senhonora !
ROZ. Kiu donis al ci tion ?
RAM. Ci rekonas ĝin. Ĉu ne ? Ho, maliculino !
LUK. (*Forte, forte !...*)
RAM. Ci trompis min kun perfidmortigisto !
ROZ. Kion mi aŭdas ? Ĉu estis tiu homo ?...
RAM. Nature !
ROZ. Mi ĵuras al ci ke mi ne konis lin !
RAM. Ho ! Ci ne konis lin kaj tamen lin nomis su-
kerapacetulo !
LUK. (Ha, ha, ha ! Kiel mi ĝuas !)
ROZ. Sed ĉu ci supozas ke estis mi tiu kiu..?
RAM. Ĉu ci kuragos tion nei ? Ĉu ci povos nei cian
skribadon ?
ROZ. Ne sinjoro. Mi ne neas mian skribadon. Mi
skribis tiujn leterojn; sed ilin diktis al mi
alia virino.
RAM. Ĉu ?
LUK. (Kiel amuza tio estas !)
RAM. Ĉu alia virino ?
ROZ. Ŝi petis al mi tion fari kaj mi por komplezi al
ŝi... Ŝi estas la kulpulino. Ŝi sola.
ROZ. Kiu ŝi estas ? Kiel ŝi estas nomata ?
ROZ. Ĉu ci ĵuras gardi la sekreton ?

- RAM. Mi tion ĵuras.
ROZ. Do ŝi estas...
LUK. (*Sin balancante en la seĝo*). Ha, ha, ha!.. Sed kiel amuza!
ROZ. La edzino de la Sekretario. (*Tiu ĉi, dorse, falas teren. La fenestro fermiĝas*).
RAM. Ĉu la Sekretariedzino?
RAM. Kiam mi estis kiel servistino en ŝia domo mi skribis al ŝi tiujn leterojn eĉ sen koni la personon al kiu ili estis adresitaj.
RAM. Ĉu vere?
ROZ. Do kion ci imagis pecego da barbaro.
RAM. (*Ridante*). Kiel amuza! Ha!... ha!... ha!...

SCENO XXV*

La nomitaj. Ĉiuj la aliaj kiuj estas en la ĉambro dekstra. Poste LUKO tute pala kaj kun la hararo senorda.

- BALT. Ni jam laciĝis pro tiom da atendado!
RIM: Ĉu oni finas la juĝon aŭ ne?
LUK. (*Aperante*). Jes! Mi ĝin finos nun mem, sed per bastonega batado... (*Al Ramono*). Mi aŭskultis ĉion!
RAM. Ĉu jes? Ĉu vi aŭskultis la... Kiel amuza, amuzega! ha, ha, ha!...
LUK. Do tio ne amuzas min. Tuj! (*Li iras al 2^a maldekstra*). Eliru. Mi krevos lin.

SCENO XXVI*

La nomitaj kaj KAROLO tra la 2^a maldekstre. Li aperas vestita tute same kiel la unuan fojon.

- KARL. Bonegan nokton!
BALT. Ĉielo! La mortinto! Morand!
ĈIUJ. Ĉu Morand?


- BALT. Oni ne mortigis lin !
LUK. Kion vi diras ?
BALT. Mi diras ke li estas Morand. Mi rekonas lin.
Mi estas certa.
LUK. Kaj la alia ? Kie estas la alia ?
KAR. Ĉu la alia ? Jen, vidu lin. (*Li senvestigas sian maskveston kaj la barbon kaj okulvitrojn*).
ĈIUJ. Ho !
KAR. Morand kaj mi nur estis unu kaj la sama. Vi volis kondamni min tial ke mi mortigis min mem, sed, sorte, mi trovis mian maskveston kaj...
RIM. Mi jam diris!
JOH. Malbenita estu mia sorto !
RAM. Kaj mi kiu la krimon malkaŝis !
BRUN. Bedaŭrindaj 15 jaretoj !
LUK. Do, ĉu estis mia edzino tiu, kiun ci amis ?
(*Malkaŝe kaj aparte al Karolo*).
KAR. Ĉu mi ? (Demono).
LUK. La leteroj estis skribitaj de Rozo, ŝia servistino.
KARL. Ho. (Mi komprenas !)
LUK. Sed, Rozo, kiun mi kulpigis, ĉion konfesis al ŝia edzo.
KAR. Ĉu ŝi ĉion konfesis al sia edzo ? Nature !
LUK. Kiel ?
KAR. Ĉu vi ne komprenas ke ŝi tiel agis por savi sin.
LUK. Ho ! Ĉu estis Rozo ?
KAR. Jes, sinjoro. Sed, silenton ! Ke la alia ne sciigu pri tio.
LUK. Mi estos tomba ! (*Prezentas al li la manon*).
KARL. (Malfeliĉulo !)
RAM. (*Al Luko*). Kion vi rakontas ?
LUK. Nenion. La afero estas ke... Kiel amuza ĝi estas !... Ha, ha, ha !... (*ridante*).
RAM. Same mi opinias kiel vi; kiel amuza, amuzega, ha, ha, ha !... (*Ili ambaŭ ridas; unu pri la alia*)
RIM. Kaj nun, mia, boŝlo, venu al miaj brakoj.
KAR. Momenton, sinjorino. Anstataŭ ĉirkaŭpreni min, ĉirkaŭprenu tiun junulon. (*Johanĉjo*).
RIM. Kiel ?
JOH. Kion mi aŭdas ?

KAR. Ili reciproke sin amas. Mi forlasas la edzigon kaj mi foriros al Madrido tuj kiam ektagos.

RIM. Kiel vi volu!

JOH. Ĉiam mi diris ke tia nazo nur povis esti kunportita de konvenega persono.

FALAS LA KURTENO



ERAROJ

En la paĝo n.º	Linio n.º	Anstataŭ	Oni devas legi
8	35	Sia	Ŝia
10	lasta	Iu	Iun
12	26	finigu	finiĝu
15	6	<i>Johanĉio</i>	<i>Johanĉjo</i>
»	13	us	Ĵus
16	5	kusiĝis	kuŝiĝis
20	12-13	<i>lasasteren</i>	<i>lasas teren</i>
»	19	<i>vtnon</i>	<i>vinon</i>
23	6	Jus	Ĵus
31	21	Cia	Kia

Unu fojon...

Humoraĵaro taŭga por la Esperanta lernado, sin amuzante. *

Unu ekzemplero	0 120 sm. (0'30 fr.)
10 »	1 » 2'50 »
50 »	4 » 10 »

Mendojn (kun mona antaŭsendo) al S-ro Mikaelo Cases: Salmerón, 229; BARCELONA - España.



R. TOBELLA

Eldonisto de CLAU ESPERANTO
kaj POŝVORTARETO

18, Carme, 18 - Barcelona
ESPERANTA PRESEJO